# Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si por Hispanio kaj la Homaro

Nº 3 1-a JARKOLEKTO MAJ -84

## 44-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

De la 6-a ĝis la 12-a de Julio 1984

## SEVILJO



Gazeto Andaluzia

Fondita en 1910

Oficiala Organo de A.E.U.

EDITA - ELDONAS

Asociación Andaluza de Esperanto
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Redaktoroj

Andrés Martín González. Malago
José Mª Rodríguez Hdez. Kordovo
Alberto Franco Ramírez. Seviljo

ENHAVO

Ĉefartikolo — 1
Informoj — 2
Nia Sintemo — 5
Paĝo de la Junularo — 7
La deveno de la lingvoj — 8
Pri la koncepto de lando kaj nacio en Blas Infante — 9
Noto de la Redakcio — 10
Poezio — 11
Amuzaĵoj — 12

ADRESOJ

Grupo de Esperanto
IB SENECA
Apartado 611 Córdoba
14080

Centro Cultural GFU
Sección Esperanto
C/ Trinidad Grund 28 2º
29001 MALAGA

Asociación Sevillana
de Esperanto
C/ Sol 75 41003 SEVIL[...]

"La opinioj ĉi tie verkitaj apartenas nur al la subskribantoj"

Kunlaboras ĉi-numere krom la redaktoroj:

- Luis Gilpérez Fraile,-Antonio Rodríguez Gasch.

PRESITA ĈE LA KORDOVA ESPERANTISTO

# ĈEFARTIKOLO

Ĉi tio ja ne volas esti ĉefartikolo sed simpla alvo[…] ĉiuj andaluzoj. Estimataj Amikoj la Andaluzia Esperanto-Unuiĝo [...] leĝe ekzistas, la Ministerio aprobis niajn statutojn kaj ekde n[…] komencas konstrui tion kion antaŭ nur unu jaro ŝajnis neeblan r[…]

Kompreneble ankaŭ ni devas labori, legi revuojn ne [...] nur la laboro kiun devas plenumi la andaluziaj gesamideanoj; ek [...] ĝu al AEU, ĉeestu ĝiajn kongresojn kaj renkontiĝojn kaj partopr[…] ĝiaj projektoj. Ek! gesamideanoj de Almerio, Onubo, Jaeno, Gra[…] Ceŭto, Meliljo kaj Kadizo, disvastigu nian lingvon kaj nian int[…] ideon en viaj urboj kaj provincoj. Ek! ceteraj hispanaj geespe[…] toj unuiĝu laŭ la hispanaj aŭtonomaj komunumoj kaj plifortigu l[…] panan Federacion.

En venontaj numeroj de nia revuo, kiu jam oficiale [...] la organo de la Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, vi trovos la kotizo[…] agadplanojn de AEU. Bonvolu neniam permesi ke ĉi ideo kaj asoc[…] tu pro la mallaboro, tim kionaskiĝ revaj andaluziaj geamikoj [...] [..]zisti ĝis la fina venko de ESPERANTO, ek! aliĝu kaj partopren[…] la unuanura, sendependa, aktiva kaj klera: ANDALUZIA ESPERANTO-UN[…]

LA REDAKCIO

# INFORMOJ

## MALAGO

Ekde la lastaj monatoj, oni povas diri ke preskaŭ uj niaj agadoj estas direktitaj al la aranĝoj por la a Andaluzia Kongreso de Esperanto, ĉar vere tia even postulas grandan laboron (t.e. pliboniĝado de la Kon esejo, farado de la Kongreslibro, pruvludoj de la tea aĵoj, ktp). Tamen ni ne povas forgesi tiujn aliajn as ktojn de E-Grupo, kaj jene vi povas legi pri nia la- ro por la disvastigo de Esperanto en nia urbo.

Ĵaŭde, de la 19-a ĝis la 21-a kunvenas pluraj el niaj membroj por sekvi progresigan kurson.

Marde kaj vendrede, dum sume tri horoj, s-ano Rafael López (delegito de HEJS) gvidas elementan kurson por komencantoj.

La 24-an de Junio, s-ano Julio Herrero faris prelegon pri la Internacia Lingvo en la Kulturdomo de Cpín ilaĝo de Malago).

7 anoj de nia grupo partoprenis la 44-an Hispanan Kongreson de Esperanto, okazintan en Seviljo, de la 6-a ĝis la 12-a de Julio.

S-ano Angel Arquillos zorgas pri la Perkoresponda Kurso por tiuj lernantoj loĝantaj for de Malago.

JHS

## KORDOVO

Okazis en Aprilo la 8a HEJS-Tendaro organizita de la Kordova Grupo, la kunveno sukcesis (vd apartan artikolon). La Partopreno estis sufiĉe nombra kaj la rezultoj tre pozitivaj por la estonteco de HEJS. Venontjare, gejunuloj, al Malago!

Finis la 4-a Elementa Kurso de E-o organizita de la Grupo de E-o IB "Séneca", ĉi-jare la kurso estis tre

pozitiva. La etoso, kial kutime, estis mirinda ka
gelernantoj aktivaj. Denove oni rimarkis la grav
de la grupo de esperanto ene de la Kultura Fako d
Gimnazio SENECA dum la disdonado de la diplomoj,
estis liverataj de la estraro de la Gimnazio.

- Ankaŭ en la IB López Neyra finis la Kurso de Esp
to. Ĉi tiel post fini la lecionaroj la klariganto
ambaŭ kursoj, s-anoj Lubén Fernández kaj José Mª
guez, organizis atan renkontiĝon por la lernantar
okazis en Junio en la IB Séneca, bedaŭrinde la ĉe
ne estis tre nombra, ĉar Junio estas ekzamena per

- Unuafoje la Kordova Grupo ĉeestis eksterkordovan
venon, ĝi estis la pasinta 44-a Hispana Kongreso
topreni 6 gemembroj de la Grupo kaj ankaŭ unuaf
post multaj jaroj salutis al la kongresanaro kord
reprezentanto.

## SEVILJO

- Okazis en Seviljo la 44-a Hispana Kongreso de Es
to, kiu temis pri "Turismo, ĉu socia fenomeno?"
ĝia sukceso ni ne povas juĝi. Ni povas resume di
ĝi enhavis sufiĉe da neoficialaj interesaj progr

- Ekde la venonta septembro, okazos en la sevilja
zio "Valázquez" esperantaj kursoj gvidotaj de iu
fesoro de Sevilja Esperanto-Akademio. La metodo u
estos verŝajne ¿Sabe ud. Esperanto? de Jorge Hess

- Sevilja Esperanto Junulara Organizo finfine ensp
subvencion de la Urbodomo, kiun oni petis antaŭ
kaŭ du jaroj. La kvanto estas 150.000 ptoj. Tial
organizos kelkajn kunvenojn por ke la tuta membra
niu kion fari per tiu monkvanto.

- Kiel vi jam scias, okaze de 44a Hispana Kongreso
eldonis dank'al la Sevilja Urbodomo kvar luksajn

perantlingvajn broŝurojn priurbajn. Se vi volas senpage akiri ilin, mendu rekte ekzemplerojn al la jena adreso: Excmo Ayuntamiento de Sevilla (Del. de Turismo) Av. de María Luisa S/N . SEVILLA-13.

- Tuj post la Kongreso, kelkaj reprezentantoj de la seviljaj grupoj de esperanto kune kun reprezentantoj de HEF kaj ĉefdelegito de UEA, s-ano Juan Azcuenaga, vizitis nian veteranon Moŝta s-ro Rafael Fiol Paredes por iel omaĝi lin, liveri memordonacon kaj interŝanĝi kelkajn amikvortojn.

- Dumsomere oni starigos konversaciajn rondojn ĉiulunde de la 20-a ĝis 21´30-a proksimume en la sidejo de strato Sol 75. Dum la unua horo oni legos tekstojn de "Paŝoj al Plena Posedo", kaj poste oni praktikos per ĝi kaj priparolos la temon pritraktitan en la legita teksto. Ceestu niajn rondojn! Sekvos ilin ĉeesti al bierejo.

**KOMUNA AGADO**

- Post ellabori la statutojn ili devis esti subskribitaj de la gemembroj Fondinta Estraro, kiuj loĝas en Kordovo, Malago, Almerio kaj Seviljo. Laŭ ĉi ordo la Statutoj kaj la Fondinta Akto devis trairi tutan Andaluzion ĉio finis bone kaj nenio restis survoje.

- Okaze de la 44-a Hispana Kongreso kaj jam kun statutoj, instancoj,akto, oficialaj markoj kaj ĉio kio estas necesa por oficialigi ion, tri membroj fondintaj: Julio Herrero, Alberto Franco kaj Ĉema Rodríguez prezentis la dokumentaron antaŭ la Registaro, nun ili devas atendi ĝian respondon (paciencon, amikoj, paciencon).

# N I A  S I N T E N O

Feliĉe, la venontan aŭguston ĉiuj ni andaluzaj esperatistoj ĝuos mirindan ŝancon por plifortigi nian idealon cerbumante pri nia konkreta situacio. Nur por havigi al la ceteraj samideanoj iujn elementojn konsiderindajn mi redaktas ĉi artikolon, esperante, ke ĝi estu utila en supera estonto.

Ni amas Esperanton kaj Andaluzion. Ni klopodas pri la antaŭeniro de la Movado en ĉi parto de Hispanio kaj gajas kiam, pli-malpli sukcese iu el ni atingas ion favore al Esperanto. Ĉio ĉi estas bonega kaj, kiam tiel okazas, tio montras la union de la andaluza esperantistaro kaj esperigas ĉiujn. Tiaj sintenoj nepras por antaŭenpuŝi serioze la Movadon. Kvankam tio, tamen, l problemo rilata al la disvastigo de nia kara lingvo daŭras sen efika solvo ĉar, blindumitaj de nia entuziasmo kaj de iuj izolitaj sukcesoj, ni opinias ke Esperanto estas agnoskata de sufiĉa kvanto da samlandanoj, kaj, de tiu momento, ni malstreĉas nian spiriton. Ĝuste pro tio, konvenas okazigi renkontiĝojn kia la nuna por, meditante pri la konkreta situacio kiun ni travivas, mal kovri taŭgan strategion por la senpera estonto.

Multaj el ni, ne laborante konstante en la Movado, be daŭras senĉese la foreston de la registaraj instancoj kaj kulpigas senrespondece ilin pri la malsukcesoj kiujn la hispana esperantistaro trovas en sia penado. Al tiaj samideanoj mi diras tute simple, ke la Socio kaj ties reprezentantoj ne helpas nin ĝuste pro la spektaklo kiun mi montras al ili. Neniu povas eniri en kl ran grupon kiam ties anaro prezentas sin antaŭ la publiko hobie. Serioza celo bezonas seriozajn agadplanojn estigitajn kaj plenumotajn de serioza kaj kapabla teamo. Kompreneble, ĉiuj ni konsentas pri la nepreco kaj praveco de nia idealo, sed tio ne sufiĉas por sukcesi. Necesas, ke ĉiu esperantisto agadu respondece kaj kunlaboru senlace. Kiun vojon konvenas sekvi? Mi proponas la jenon:

1.- Ĉiu devas pligrandigi siajn konojn pri la lingvo, kaj la Movado. Ĉi tasko neniam finos.

2.- Neniu kapablas varbi novajn membrojn se li mem ne estas tute certa pri la graveco de sia propono. Tial, antaŭ ol intenci konvinki la ceterajn konvinku nin mem per la necesa enpensiĝo.

4.- Ankoraŭ ne enradikiĝis Esperanto en nia lando. Por tion atingi, ni prizorgu la enkondukon de nia lingvo en ĉiuj organizoj kaj ke ties membroj konu kaj uzu ĝin.

5.- Al personoj sentemaj parolu emocie, al intelektulo, racie, al ĉiu-j laŭ la vindpunktoj ŝatataj de ili mem.

6.- Ĉiu persono konscias pri la limigoj de nia socio rilate al la atingo de la monda paco; profitu ĝion por enkonduki esperantan idealon en lia vivo.

7.- Antaŭ ol paroli pri la lingvo, parolu pri la "interna ideo".

8.- Flirtemuloj estas balastoj. Ĝoju kiam ili forlasos nin.

9.- Esperantisto estas, krom parolanto de Esperanto, persono kun esperanta kriterio pri la Homaro. Vivu ĉiam akorde kun niaj ideoj !

10.- La homamasoj ĉiam estas gvidataj de malplimultuoj. Pro tio ne plendu pri la malgranda nombro da samideanoj ĉirdaŭantaj vin.

11.- La solvo de niaj problemoj troviĝas en vi mem. Kulturu vian esperantistecon.

Resume, ĉi tiuj estas la konsiloj kiujn mi, respondece, proponas al miaj andaluzaj samideanoj okaze de la venonta Dua Kongreso de Esperanto en Andaluzio organizata de kaj por andaluzaj esperantistoj. Miaflanke, kiel ĉiam ŝatas nepre paroli klare pri niaj problemoj. Nur tiamaniere ni ekvojos sur solidan terenon kaj la ceteraj komprenos definitive ke Esperanto estas plej grava afero. Neniam forgesu, ke multaj eksterมovadanoj atendas la ateston de nia sincereco por eniri en niajn organizojn kaj sindoni al la efektivigo de nia idealo.

Kompreneble, evidentas ke la esperantistaro pligrandiĝos tiom kiom la nombro da personoj praktikantaj la lingvon. Tial nepras profiti ĉiujn ŝancojn por disvastigi la Internacian Lingvon instruante estontajn profesorojn kiuj, siatempe, lernigu Esperanton al aliaj individuoj. Serioza agadplano diskonigi Zamenhofan lingvon inkluzivas necese la estigon kaj efikan funkciadon de Esperanto-Lernejoj. Ĝuste tia kriterio, enkopiĝita de Hispana Sekcio de ILEI, gvidas la nunan laboron de la hispanaj instruistoj de Esperanto aliĝintaj al ĉi internacia organizo.

Siavice, La Hispana Sekciestro de ILEI troviĝas ĉiam pr-
ta informi amplekse pri la projekto kaj, kompreneble, akceptos
ĉiujn kunlaborojn. Ankoraŭfoje, ĉi alvoko konsistiĝos tre grav.
teston por mezuri la respondecon de la hispana esperantistaro.

Miaflanke, pretas kunlabori sincere kun la ceteraj.

Kion vi faros?

ANDRES MARTIN GONZALEZ
Hispana Sekciestro de ILEI
Prezidanto de AEU (Andaluzia Esperanto-Asocio)

# PAĜO DE LA JUNULARO

La venontan Decembron okazos en Madrido kunveno de la Hispana Esperantista Junulara Societo, dum ĝi oni prezentos la regularon de la Andaluzia Esperanto-Junularo (AEJ). Se la Estraro de HEJS aprobas ĝin oni prezentos denove al la Andaluzia Esperanto Unuiĝo (AEU) dum ĝia kunsido de Decembro.

Atentu! Se vi volas kunlabori kun ĉi junulara sekcio, memoru ke devas ekzisti membraro kaj estraro, bv. kontakti kun:

- José María Rodríguez Hernández
Grupo de Esperanto-IB "SENECA"
Apartado de Correos nº 611
14080 CORDOBA (Andalusio)

AEJ

# LA DEVENO DE LA LINGVOJ

Ekde la nasko de la Prahistoria Scienco, dum la dua duono de la pasinta jarcento, la trovaĵoj kaj esploroj ebliĝadas eksterordinare sed ankoraŭ ni estas tre fore de la totala kono pri la deveno de la homo, de ĝia rasa kaj kultura disvolvado, kaj ankoraŭ pli fore de la senco de la tuta procezo.

Novaj restaĵoj kaj trovaĵoj iom post iom kontrolos aŭ ne la aktualajn teoriojn pri la deveno de la homaj rasoj kaj de multaj aliaj hipotezoj, sed eble neniam povos lumigi kun certeco, la veran devenon de la lingvaĵo.

La deveno de la lingvaĵo estas afero, kiu intrigadas al la pensuloj kaj sciencistoj tra la jarcentoj. Temas efektive pri la fundamenta trajto kiu malegalas al la homoj de la bestoj, sed kiam naskiĝas tia trajto?

La unua paŝo estis eble la kapablo por formi konceptoj en unu mensaĝo, kiu estas ebla dank' al tio, ke en tiu ago partoprenas la voĉajn stimulojn. La "aŝeulensanoj" eble havu tial kapablon (je la vido de siaj ŝtoniloj) kaj tiuj prahomoj vivs antaŭ 200.000 jaroj. Se tio estas ĉiel, ili estis la unuaj kiuj kombinante silabojn formis vortojn.

La unuaj vortoj, kiuj devis esti malmultaj kaj fundamente unusilabaj, esprimus sole la ĉefajn agadojn de tielaj homoj, tio estas, pri ĉasado kaj rikoltado, sed eble la riĉigado de ĝiaj vortoj estis tre malrapidaj.

Se la parola sistemo estas kune kun la produktaĵoj el la mana laboro, pli fidela provo ol la pensa esprimado, kvankam ni ne havas rektajn atestojn el la parola esprimado ĝis la apero de skribado, ni povas dedukti per siaj manaj laboroj, ke estas la Homo el Kro-magnono (proksimume 40.000-30.000 jarojn), la unua kiu estis kapabla formi duoblajn kombinojn de konceptojn kaj vortoj, tio estas, ili jam superregis la artikigatan lingvon, ĉar ili estas ankaŭ tiuj, kiuj superregis la manan laboron inkluzive en sia plej alta senco: la arto.

Dum la sekvintaj epokoj, iom post iom la diversaj sistemoj de esprimado estus ellaboritaj, per siaj fonetikaj gramatikaj strukturoj ĝis la naskiĝo de la grandaj lingvistikaj sistemoj kiuj eble aperis je la fino de Neŭlitiko (proksimume 5.000 jarojn), ĵus en la erao de la Metala Epoko.

La lingvistika scienco nepre scias, ke la formado de multaj nuntempaj lingvoj datiĝas je tempoj relative modernaj.

Resume, ne ŝajnas ke la homaro antaŭeniras multe: post 1.000.000 jaroj, ni ankoraŭ ne kompreniĝas.

LUIS GILPEREZ FRAILE

## PRI LA KONCEPTO DE LANDO KAJ NACIO EN LA VERKARO DE BLAS INFANTE

Por tiuj kiuj ne konas la verkojn de Blas Infante estas necese antaŭdiri ke la naciismo de ĉi politikisto ne estas naciismo laŭ la "nordaj" teorioj, tio estas naciismoj bazigitaj en la tuta defendo de propra lingvo, kulturo kaj eĉ vivmaniero disvolvitaj ene de konitaj landlimoj.

Male Blas Infante proklamas la tiel nomita "naciismo kontraŭnaciista", ne ekskluziva kaj universala. Por li la landoj estas kruela eŭropa invento, kiu rpovokis pli ol 30 landoj nur en unu malgranda kontinento. Infante ne akceptas la landlimojn proklamitajn en la Kongresoj, kontraŭ la opinioj de Talleyrand kaj Metternich, li kredas ke tiuj dividoj nur provokas ŝtatojn timajn kaj obstinajn pro sia teritoria unueco. La lando ekzakte ne ekzistas, neniu homara unuigo rajtas amasigi en si mem forgesante la ceteran homaron.

Naskiĝas tiel la tre konkreta signifo de lando. Kontraŭe la koncepto "nacio" estas pli uzinda. Dum la sevilja Kongreso ŝiuj povis vidi murskribon kiu, malgraŭ malpurigi la tre belajn seviljan konstruaĵojn, enhavis tre konkretan mesaĝon: "Ni estas Nacio". Efektive en sia verkaro Blas Infante tion proklamis, Andaluzio ne estas lando ĉar Andaluzio ne havas ekskluzivajn landlimojn. La naciista andaluzia agado komencas en nia regiono por ĝia savo, tamen neniel oni povas fini tie, sed oferi sian forton unue al Hispanio kaj poste al la tuta Homaro.

Tial la verkoj de Blas Infante posedas karakteron kiu igas ilin tre originalaj. Ili ne parolas pri sendependo, ĉar ĝi ne bone komprenas kiam la revo de popolo estas detrui la limojn.

Li defendis la andaluzian nacion ene de Ibera aŭ Hispana Federacio (unu aŭ alia projektoj dependas de la epoko) ne forgesante la orienta projekcio de nia regiono.

La andaluzismo ne sanĝis, ĝi ne estas porsende penda movado, ni ja estas nacio malferma al ĉiuj, ĉar en Andaluzio ne estas eksterlandanoj, diris Blas Infante. Tiu stranga koncepto de la andaluzia naciismo estis tre bone esprimita kun la vortoj de Calvo Hernando kiam en la klubo "Siglo XXI" prelegis pri "Tiu Strangaĵo de la Andaluzismo".

JOSE MARIA RODRIGUEZ HERNANDEZ

Taŭga Bibliografio pri ĉi temo:

- "Cartas Andalucistas"
- "La Verdad sobre el Motín de Tablada"
- "Ideal Andaluz"

NOTO DE LA REDAKCIO:

La intenco de ĉi redakcio estas aperigi la revuon GAZETO ANDALUZIA jene:

- nº 4: en la unuaj semajnoj de Decembro.
- nº 5: meze de Decembro.
- nº 6: en la unuaj semajnoj de Januaro.

# poezio

## JE KORDOVO

Ho, svelta muro, ho, turoj honoraj
kronitaj de mošteco, de bravgracio!
Ho granda river´, granda reĝ´ de Andaluzio,
de nobelaj sabloj, sed ne oraj!

Ho fruktodona ebeno, ho montoj vertaj,
kiun privilegias ĉiel´,kaj la tag´igas el or´!
Ho patrujo mia ĉiam kun glor´,
ĉu per saĝaj plumoj ĉu per glavoj lertaj!

Se inter tiuj ruinoj kaj ŝiraj nuloj
kiun riĉegas Genil kaj banas Daro
ne estis mia elspiro via memoro,

neniam meritu miaj foraj okuloj
vidi viajn murojn, viajn turojn kaj montaron,
vian riveron, vian ebenon,ho patrujo,ho de Hispanio
floro!



LUIS DE GONGORA

El la hispana tradukis:
José María Rodríguez Hernández

# AMUZAĴOJ

## ENIGMO

La patro de la bela Porzja ofertis sian filinon al tiu junulo kiu povus solvi specialan ludon.
Porzja kaj Basanjo amis sin reciproke kaj tiel li akceptis ludi. Li solvis la enigmon kaj fine li edziĝis Porzjan. Nun intencu solvi ĝin vi mem !

"Sur tablo estas tri kofroj, ora, arĝenta kaj plumba; en unu el tiuj estas portreto de Porzja. Legu la notojn kiuj staras antaŭ la kofroj, sciante ke nur unu el tiuj notoj estas certa. Kie estas la portreto de Porzja?"





| | | |
|---|---|---|
| Ĉi tie estas la portreto de Porzja. | La portreto de Porzja ne estas en la ora kofro. | La portreto de Porzja ne estas en ĉi tiu kofro. |

---

Solvo de la pasinta enigmo.-

La apero de la fantomo daŭras 13´2 skundojn. Kial?
Se 6 sonorludoj daŭras 6 sekundojn: inter 2 sonorludoj pasas 6/5 de sekundo. Se entute estas 11 intersonoj: 6/5x11 = 13´2




Solvis la enigmon kaj atingis premion:

- Inmaculada ILLANES ORTEGA de Kordovo.
- Ricardo F. ALBERT REYNA de Malago.

---

Se vi konas la solvon de la nuna enigmo, sendu ĝin al ni kiel eble plej rapide, kaj vi atingos belajn premiojn.

"GAZETO ANDALUZIA"

I M P R E S O S

ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO
ASOCIACION ANDALUZA DE ESPERANTO
A.E.U.
CORDOBA